XIX ORDINARA TEMPO – 8.an de aŭgusto 2010

ANKAŬ VI ESTU PRETAJ – Komento al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Lk 12,32-48

En tiu tempo, Jesuo diris al siaj disĉiploj: "Ne timu, malgranda grego; ĉar bone plaĉis al la Patro doni al vi la regnon. Vendu viajn posedaĵojn, kaj donu almozon; faru por vi monujojn, kiuj ne fariĝos malnovaj, trezoron ne mankontan en la ĉielo, kie ŝtelisto ne alproksimiĝas kaj tineo ne detruas. Ĉar kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro.

Viaj lumboj estu zonitaj, kaj viaj lampoj estu brulantaj; kaj vi mem estu similaj al viroj, kiuj atendas sian sinjoron, kiam li revenos de la edziĝa festo; por ke ili tuj malfermu al li, kiam li venos kaj frapos. Feliĉaj estas tiuj servistoj, kiujn la sinjoro, kiam li venos, trovos viglaj; vere mi diras al vi, ke li sin zonos, kaj sidigos ilin por manĝi, kaj mem venos kaj servos al ili. Kaj se li alvenos nokte dum la dua gardoparto, aŭ dum la tria gardoparto, kaj tie ilin trovos, feliĉaj estas tiuj servistoj.

Sed sciu, ke se la dommastro scius je kioma horo la ŝtelisto venos, li maldormus kaj ne lasus sian domon trafosiĝi. Vi ankaŭ estu pretaj, ĉar en tiu horo, kiun vi ne pripensas, la Filo de homo venos."

Tiam Petro diris: "Sinjoro, ĉu vi parolas ĉi tiun parabolon por ni aŭ ankaŭ por ĉiuj?" Kaj la Sinjoro diris: "Kiu do estas la fidela kaj saĝa administranto, kiun lia sinjoro starigos super sia servantaro, por doni al ili ĝustatempe ilian porcion da nutraĵo? Feliĉa estas tiu servisto, kiun lia sinjoro, veninte, trovos aganta tiel. Vere mi diras al vi, ke li starigos lin super ĉio, kion li havas. Sed se tiu servisto diros en sia koro: "Mia sinjoro prokrastas sian alvenon; kaj komencos bati la knabojn kaj la knabinojn, kaj manĝos kaj trinkos kaj ebriiĝos, la sinjoro de tiu servisto alvenos en tago, kiam li ne atendas, kaj en horo, pri kiu li ne scias; kaj tranĉe skurĝos lin, kaj difinos por li parton kun la senfiduloj.

Tiu servisto, kiu sciis la volon de sia sinjoro, kaj nenion pretigis, nek faris laŭ lia volo, suferos multajn batojn; sed tiu, kiu ne sciis, kaj laŭ siaj agoj meritis batojn, suferos malmultajn batojn.

Al kiu multo estas donita, el tiu estos multo postulata; kaj al kiu oni multon komisiis, el tiu oni des pli multon postulos."

Ĉiuj Evangelioj havas eŭkaristian spiron. Kion tio signifas? Ke la eŭkaristio estas je la centro de la agado, de la penso kaj de la teologia linio de la evangeliisto, ĉar la eŭkaristio estas la momento grava, altvalora kaj nepra por la vivo kaj por la kresko de la komunumo.

Estas en la ĉidimanĉa Evangelio altvalora perlo per kiu Luko indikas al ni kio estas la eŭkaristio. Kio estas la eŭkaristio?

La eŭkaristio ne estas kulto kiun la komunumo de la kredantoj oferas al Dio, sed, male, ĝi estas la momento en kiu la komunumo de la kredantoj akceptas iun Dion kiu sin proponas al ili. Ni aŭdu la evangeliiston en tiu tre grava peco, en kiu Jesuo invitas al plena fido en la Patro, kiel li prezentas la eŭkaristion. Jesuo invitas esti pretaj "*kun la lumboj zonitaj*" kio signifas agemo, disponemo, servado. Kiam oni sin metadis je alies servo oni tenis la vestojn sur la lumboj per zono.

Li diras krome: "*Estu similaj al tiuj kiuj atendas sian mastron*" estas la greka vorto Kyrion, ĉi tie sinjoro, *"kiam li hejmenrevenas de geedziĝa festo, tiel ke kiam li alvenas kaj frapas, oni tuj malfermu al li".* Do, skribas la evangeliisto, "*Feliĉaj*", plene feliĉaj, "*tiu servoj kiujn la mastro je sia reveno trovos ankoraŭ viglaj".*

Do tiuj kiuj, kiam la sinjoro sin prezentas estas servantaj – ili ne estas servistoj de la sinjoro, ili estas tiuj kiuj libervole metas sian vivon je la servo de la aliaj – Jesuo ilin vokas feliĉaj. Kial? La logiko dirus ke se la mastro hejmenrevenas kaj trovas la servojn ankoraŭ viglaj li devigos ilin servi lin. Jen male la sensacia novaĵo portata de Jesuo: "Ververe mi diras al vi", do li certigas pri io tre grava , "*li sin zonos*".

Ni diris ke zoni siajn lumbojn estas indiko pri la servado. Jen, Dio, la Sinjoro, estas kiu sin prezentas kun la markilo de la servado, ne kiel mastro kiu petas esti servata de siaj servistoj, sed kiel sinjoro kiu agas kiel servisto, por ke tiuj kiuj estas tiel konsiderataj, sin sentu liberaj.

"*kaj li sidigos ilin por manĝi, kaj mem venos kaj servos al ili".* Jen kio estas la eŭkaristio, la momento grava, altvalora, nepra dum kiu la komunumo de tiuj, kiuj libere metis sian vivon je la servo de la alies bonfarto, estas ripozigataj de la Sinjoro, kiu persone servos ilin, tio estas por ilin reŝarĝi per sia mema viviga energio, komunikante al ili la vivon.

Tio estas la signifo de la eŭkaristio.

Kaj, daŭrigas Jesuo, "*Kaj se li alvenos nokte dum la dua gardoparto, aŭ dum la tria gardoparto, kaj tie ilin trovos, feliĉaj estas tiuj servistoj!".* Tio signifas ke la sinteno de la kredanto ĉiam estas tiu de la servado. Kie estas la servado, la Sinjoro kunlaboras kun sia Spirito. Do al tiu kiu servas la Sinjoro ĉiam komunikas siajn energiojn.

Sed estas Petro kiu, kiel kutime, montras sian maltrankvilon kaj demandas: "*Sinjoro, ĉu vi parolas ĉi tiun parabolon por ni aŭ ankaŭ por ĉiuj?",* tio estas, ĉu ĉiuj devas servi aŭ nur ni? Tiam Jesuo eldiras tiun admonon, sin adresante al Petro, sed kiu koncernas la tutan komunumon, "*Kiu do estas la fidela kaj saĝa administranto,"* estas tiu la vorto kiun la Evangeliisto utiligis - *"kiun la sinjoro starigos"* – ne kiel estron,en la kristana komunumo ne estas personoj kiuj estras aliajn - *"super sia servantaro, por doni al ili ilian porcion da nutraĵo"*

Do Jesuo metas neniun super la aliaj sed donas la taskon komuniki la vivon. Tio estas la instruado de la kredanto. En la eŭkaristio do la Sinjoro iĝas pano, por ke tiuj kiuj lin akceptos estu poste kapablaj iĝi pano por la aliaj.